

Annette von Droste-Hülshoff,

## Lastaj vortoj (0)

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Laŭvorta Esperantigo*

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,  
ne postploru min per iu larmo;  
ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,  
tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta,  
ne foriĝu via bildo al mi,  
kaj mildigon por viaj vundoj,  
por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-flugilojn  
la paco super la mondo-regnon,  
ne pensu tiam plu pri mia tombo,  
ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

...

Annette von Droste-Hülshoff,

## Lastaj vortoj (1)

*tradukita de Manfred Ratislavo*

*1a traduk-versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru vi;  
Ĉar lumas jen en paco Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj doloro  
Mildigon volas peti mi.

Se nokte per flugilo sia  
Pac' tuŝas tiun mondon ĉi,  
Ne pensu plu pri tombo mia,  
Vin de l' stelar' salutas mi.<sup>2</sup>

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)*

*Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05.15.*

*Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)*

*La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la socio "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, baumann@droste-gesellschaft.de, www.droste-gesellschaft.de) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.*